 " Kiom da biletoj vi deziras ? " demandas la oficisto ĉe la giĉeto.
 " Nu, mia edzino kaj mi, mia knabeto kaj mia bopatrino..."
 " Do 4 " respondas la oficisto.
 " Sed, replikas la patro, certe ne estas la sama prezo por tiu-ĉi knabeto, kiel por la plenkreskuloj, li ne estas ankoraŭ 8 jara ! "
 Tiam la oficisto okulumas super siajn okulvitrojn.
 " Fakte, veras, li surhavas mallongan kuloton, tiam li pagos nur duonprezon. "
 " Diable ! se la prezo akordiĝas laŭ la longeco, mia bopatrino ne devas pagi, ŝi surhavas neniun kuloton ! "
 Fonto : "Istoriou farsuz". Naïg Rozmor

LE PRIX DU BILLET DE TRAIN.

Il fait chaud et c'est dimanche.
 « Allez, tout le monde à la mer ! » dit Job à sa famille.
 Pour cela, il est nécessaire de prendre le train.
 « Combien de billets voulez-vous ? » demande l'employé au guichet quand ils arrivent à la gare.
 « Ma foi, ma femme et moi, mon p'tit gars et ma belle-mère... »
 « Ca fait 4. » répond l'employé.
 « Mais, dit le père, ce n'est quand même pas le même prix pour le mousse ici, que pour les grandes personnes, il n'a pas encore 8 ans ! »
 L'employé jette alors un coup d'œil par-dessus ses lunettes et dit :
 « C'est vrai ! il est en culotte courte, alors il ne paiera que moitié prix. »
 « Hopala ! si le prix va avec la longueur de la culotte, ma belle-mère ne doit pas payer, car elle n'en porte pas ! ».

"Ĉio kion vi faros estos malgraveta, sed gravegas ke vi faros tion" (Gandhi) esperantigis Petro
 Tiu frazo rememorigas al mi la fabelon de la kolibro. Do, jen...

Fabelo de la kolibro (rakontita de Pierre Rabhi)

Iam okazis grandega arbarofajro. Ĉiuj bestoj, teruritaj, konsternitaj, senpove rigardis tiun katastrofon. Nur la eta kolibro ageme iris serĉi kelkajn gutojn da akvo per sia beko por ĵeti ilin en la fajron. Post iu tempo, la dazipo inciteta pro tia malgravega moviĝado, diris al ĝi: "Kolibro, freneza vi estas, ĉu ne? Ne per tiuj gutoj da akvo vi sukcesos finiĝi la fajregon!"

Kaj la kolibro respondis : "Tion mi scias, sed mi agas laŭ mia kapablo"

ĈINA FABELO

Dank'al mia nepino Emma kaj ŝiaj lern-taskoj mi mire malkovris jenan fabelon :

Maljuna ĉinino ĉiutage iris al la rivero por plenigi du potegojn. Ili pendis je la du finoj de longa bastono, kiun ŝi portis sur la ŝultroj malantaŭ la kolo.

Ĉiutage kiam la maljuna ĉinino revenis hejmen, unu el la du potoj tute plena da akvo fiere diris al la alia: « Mi kapablas aldoni mian tutan enhavon da akvo. Ne vi, mia povra kunulo! ». Fakte, fendetita estis la alia pota, do ĉiutage ĝi revenis hejmen nur duonplena. Tio malfeliĉigis ĝin, hontigis ĝin. Finfine ĝi diris al la maljunulino: « Mi ne kapablas fari tion por kio mi estas modlita; mi tro hontas pri mi. Anstataŭigu min, kara mastrino ».

Sed la maljunulino milde diris : « Delongtempe mi rimarkis vian fendeton. Kaj vi, ĉu vi rimarkis la florojn laŭlonge de la vojo ĝis la rivero? Antaŭ tiu somero, mi semis florigojn unuflanke de la vojo. Dum somero, suno brilegis, sekigis la grundon, sed mi portis vin ĉiam supre de tiu flanko de la vojo. Vi ĉiutage akvumis la granojn, poste la kreskantajn florojn. Rigardu nun, kiel belege ili floras! Ili ĝojigas min dum mia irado. »

Por mediti kaj rideti...

"Ambicio estas sterkaĵo pri gloro" proponas Petro.

"Konsekvence", diras Hubert, "ambiciuloj malbonodoras" ...

Anne

Lorient

La bazo por submarŝipoj de Lorient (Emile Rebillon kaj la klubo de Hennebont)

Dum la dua mondmilito, la Germanoj konstruis kvin bazojn por submarŝipoj ĉe la franca atlantika marbordo: Brest, Lorient, St Nazaire, La Pallice, Bordeaux. (vidu la mapon)




La 10-an de majo 1940, la Germanoj atakis Okcidentan Eŭropon kaj la 21-an de junio ili okupis la urbon Lorient.

Tie estis konstruita la plej granda bazo de submarŝipoj. Pluraj kialoj pravigis tiun elekton :

- Pli sekura ol Brest pro malproksimo de la angla marbordo
- Fervoja provizado pli facila ekde Parizo (pli proksima ol la aliaj urboj)
- Fiŝkaphaveno bone ekipita, ĉeestanta glit-vojo
- Ĉeesto de vasta neuzata loko sur la duoninsulo nomita "Keroman" apud la fiŝkaphaveno
- Ĉeesto de Ateleroj de la franca arsenalo

La 7-an de julio 1940, la unua germana submarŝipo alvenis en Lorient.



La glit-vojo:

Konstruita en la jaro 1927, ĝi permesis meti 6 fiŝkapt-boatojn surteren.

La ŝipo sin metis, je la alta tajdo, super metala ĉaro sur kiu ĝi estis kunligita; poste la tutaĵo estis haŭlita per ŝnuregoj sur cirklan turnantan platformon kaj poziciita sur unu el la 6 laborejoj por riparo aŭ bontenado,

La kupol-bunkroj



La germana armeo uzis tiun glit-vojon. Kiam germanaj submarŝipoj estis surtere, ili estis atakeblaj ĉar la lokoj estis subĉiele. La Germanoj konstruis per armita-betono 2 grandajn ŝirmejojn por protekti 2 ŝipojn kontraŭ la usonaj aviadiloj. La konstruado komenciĝis en februaro 1941 kaj finiĝis en majo de la sama jaro.

Nuntempe oni povas vidi tiujn 2 konstruaĵojn. Ili estas 15 metrojn altaj, 84 metrojn longaj kaj 16 metrojn larĝaj. La dikeco de la muroj estas je 1.50 metroj. Dum novembro 1942 usona bombado detruis la glit-vojon, la 2 kupolbunkroj ne plu estis uzeblaj.

La novaj konstruaĵoj



La germana ministro TODT, inĝeniero kaj aviadisto dum la unua mondmilito, estis projektestro por la konstruado kaj la armado de tiuj novaj lokoj. Samtempe li regis germanan kvazaŭarmean firmaon por publikaj konstruoj. Li decidis uzi la duoninsulon, apud la fiŝkaphaveno, por konstrui la estontan submarŝipo-bazon. Por eviti tro longajn laborojn, ekzemple fosi ŝlimejon, 2

Lorient

Keroman 2 (K2) Ĝi estas 120 metrojn longa, kaj 128 metrojn larĝa. Ĝi entenis 7 alveolojn. En ĉiu alveolo estis unu rulponto kaj unu gruo. Supre, unu kazerno kun varmiginstalaĵo, klimatizado, kantino kaj kinejo, gastigis 1 000 homojn, La 2 konstruaĵoj estis kovritaj per 3.5 metrojn dika tegmento. Nuntempe oni daŭre povas vidi ilin. Oni bezonis ĉirkaŭ 60 000 material-vagonetojn kaj 40 000 m³ el ligna ŝelaĵoj por tiuj konstruaĵoj. La laboroj komenciĝis en februaro 1941. La unua submarŝipo alvenis dum aŭgusto 1941.



Kiel funkciis la sistemo ?

La ŝipo alvenas en la fositan alveolon en K1, ĝi lokiĝas sur metala ĉaro. Oni fermas la duklapan pivotantan pordon flanke de la maro por haltigi la akvoenfluon. Oni pumpas sufiĉe da akvo por bazigi la ŝipon sur la ĉaron kaj la tutaĵo estas tirita ekstere per elektra vinĉo sur la rulplatformon kiu povas latere moviĝi inter K1 kaj K2. Poste, oni enirigas la submarŝipon kaj ĝian ĉaron en disponebla alveolo sur fervojo per traktoro. La manipulado daŭras proksimume unu horon. Vicpecoj el la 12 ĉaroj, el la 2 moveblaj rulplatformoj kaj el la 2 traktoroj estis fabrikitaj en Germanio kaj veturigitaj fervoje al Lorient. La tuto estis remuntita kaj marveturita ĝis la duoninsulo "Keroman".

Sed rapide la novaj germanaj submarŝipoj estis tro grandaj kaj tro altaj, la germana komandantaro decidis novan konstruadon en marto 1941.



Keroman 3 (K3)

Estas normala bazo kun rekta alirejo al la maro male al K1 kaj K2. La laboroj daŭris 15 monatojn : de Oktobro 1941 ĝis februaro 1943. Ĝi estis 168 metrojn longa kaj

142 metrojn larĝa. Ĝi entenis 7 alveolojn kaj povis akcepti 13 submarŝipojn. Unu gruo kiu povas levi ŝarĝon de 30 tunoj estis instalita en 2 alveoloj. La tegmento el armita betono estis 9,40 metrojn dika.

La bataalkrozoŝipo "STRASBOURG" estis sinkigita fronte al K3, cele al protekti germanajn ŝipojn kontraŭ la aeratakoj.



Keroman 4 (K4a kaj K4b)

Novaj germanaj submarŝipoj tro altaj, ne plu povis uzi K3. La Germanoj decidis novajn konstruaĵojn plilongige al K1 por uzi la rulplatformon.

Tiuj estontaj bunkroj devis esti :

(K4a) : 160 metrojn longaj, 130 metrojn larĝaj kaj la tegmento 7 metrojn dika. Ĝi devis enteni 4 alveolojn surtere kaj 1 fositan sub la marnivelo.

(K4b) 95 metrojn longa kaj 150 metrojn larĝa. Ĝi devis enteni 3 alveolojn.

La konstruado komenciĝis dum somero 1943 kaj haltis je la komenco de 1944.



Hodiaŭ

Post la Kapitulado, subskribita la 8-an de majo 1945, la franca registaro decidis uzi la bazon. En julio 1946, ĝi estis nomata "Ĉef-Inĝeniero STOSSKOPF" honore al la arsenala subdirektoro, rezistanto, mortpafita la unuan de septembro 1944. La franca registaro malfondis la lorientan eskadron je junio 1995. La urbo Brest akceptis la novajn nukleajn submarŝipojn.

Nun regattaj ŝipkonstruejoj uzas la bazon; oni povas vidi tie la plu grandajn multŝelajn velŝipojn en la mondo kaj la muzeon "Eric Tabarly"

TARA

La ekspedicio TARA serĉis la plaston

Sabaton la 22an de novembro la goleto Tara revenis al sia registrohaveno Lorient post misio de 7 monatoj tra Mediteraneo. Tiu misio celis unue taksu la plastopoluadon, due konsciigi pri la mediaj problemoj.

La Mediteraneo estas eksterordinara eksperimentejo ĉar ĝi estas preskaŭ ferma maro. Necesas 90 jarojn por la renoviĝo de ĝia akvo. Ĝi entenas 8% de la monda biodiverseco. Tie okazas 30% de la monda martrafiko. Kaj 450 milionoj da loĝantoj vivas sur ĝiaj marbordoj.

Do pere de reto « manta » (ĝi havas naĝilon same kiel la giganta rajo) la fakuloj faris elprenojn de mikro kaj makroforĵetaĵoj el plasto en diversaj lokoj: malproksime de la grandaj urboj, marmeze kaj en la fluoj. Estas plasto ĉie



Dum 7 monatoj la ŝipo faris pli ol 300 retiradojn.

La unua konstato : « estas plasto ĉie kaj laŭ kvantoj kiujn ni ne imagis » diras Romain Troublé (Romano Truble) Ĝenerala sekretario de Tara ekspedicioj

« Tamen dum la havenhaltoj ni konstatis realan ekkonscion de la publiko. Ni havenhaltis 22 foje en 11 landoj. Ĉiufoje la akcepto de la loĝantoj estis nekredibla » diras la kapitano Martin Hertau. (Marteno Herto) Unu el la du Kapitanoj kiuj vice estris la ŝipon Tara dum la ekspedicio. « Ni akceptis milojn da personoj gejunuloj kaj plenkreskuloj. Estis rekuraĝige ĉar ili estis trafitaj per la mesaĝo de Tara : « Pri poluado per la plasto oni povas ŝangi la aktualan situacion. »

« Estas certe : la mediteraneaj landoj ekorganizigis kontraŭ la plastopoluado. »

15 francaj kaj usonaj eksperimentejoj partoprenas en tiu ekspedicio. La oceanologia observatorejo de Villefranche sur mer kunordigas la tuton

Ekde la reveno de Tara en Lorient komenciĝos la biologiaj, kvantaj kaj kvalitaj studoj pri la mikroforĵetaĵoj ankaŭ pri la planktono kaj la bakterioj kiuj estas kunligitaj.

Stéphane Bruzaud (Stefano Bruzo) instruisto serĉisto pri ĥemio de materialoj ĉe la Universitato de Suda Bretonio klarigas : « En tiu projekto, ni devas identigi kaj scii el kia fonto venas la polimeroj kaj materialoj retrovitaj. Tio permesos pli bone koni la devenon de tiuj forĵetaĵoj kaj la aktivecoj kiuj generas ilin : ujaĵoj- ĉefa fonto de la plasto en maro, sed ankaŭ fiŝkaptado turismo ... kaj agi ! »

« 80% de la plastaj forĵetaĵoj en la maro devenas de la marbordlandoj. Plasta ujo de ĉiovendejo estos tute defektita post centoj da jaroj, tamen oni uzas ĝin nur kelkajn minutojn » rimarkigas la serĉisto.

Necesas ĉirkaŭ du jaroj por esplori ĉion kion Tara kolektis en Mediteraneo.

Oni scias ke la plastaj eroj daŭre poluadas sed oni ne bone konas la efektojn sur la medio kaj sur la homoj. « La fiŝoj kaj la moluskoj englutas defektigitaj plastaj pecetojn. Kiam vi manĝas la fiŝojn, ankaŭ vi englutas la polimerojn kaj la almetaĵojn el kiuj konsistas tiujn plastojn. » klarigas Stéphane Bruzaud.

Eĉ se tiu vero estas maltrankviliga, la venontaj rezultoj de la ekspedicio Tara en Mediteraneo estas promesplenaj. Romain Troublé estas konvinkita pri tio :

« Se oni sukcesas solvi la problemon de la plasta poluado en Mediteraneo oni scios tion fari ĉie en la mondo. »



Receptoj

Por komenci vian manĝon, sezonan recepton

la potironan supon de Martine

Ingrediencoj :

- 1 kvarono de meza potirono sen kernetoj sed kun ŝelo

- 1 dika cepo - 2 karotoj - 3 terpomoj - pipro

- Tranĉu legomojn en pecoj

- haketu cepon

En kuirpoto fritigu la cepon per oliva oleo

Almetu legomojn, pipron, akvon.

kuiru dum proksimume 30 minutoj

Miksu longtempe ĝis obteni densan supon

En teleron almetu iom da kremo

**Kaj por malkomenci ĝin,
recepton de Jean-Pierre** (kiel kutime, ni ĉiuj gustumis!)

" pomodoro " de la fruktoĝardeno

Ingrediencoj por ses personoj

150 gramoj da butero, plus 10 g; 180 g da pulvorsukero, plus 1 kulereto; 1 saketo da vanila sukero; 4 ovo; 2 (sup)kuleretoj da freŝa kremo; 1 kulero da oranĝflora akvo; 90 g da pulvoraj migdaloj; 1 saketo da gisto; 90g da kribrita kuktritika faruno, plus 2 kuleretoj; 1 kulereto da cinamo; la ŝelo de unu oranĝo ekokultiva; 4 pomoj.

Ronda muldilo diametra je 24 centimetroj, kun alta bordo.

1-Pretigado de la muldilo

Buteru la muldilon per bakpeniko kaj enmetu ĝin en la friduĵon dum 15 minutoj. Antaŭhejtu la bakujon.

2-Surŝutetado de la muldilo

Miksu en bovlo la du kuleretojn da faruno kaj la kulereton da sukero.

Surŝutetu la muldilon per tiu miksaĵo kaj remetu ĝin friduĵen.

3-Preparo de pasto

Batmiksu kremen la 150 gramojn da butero kun la 180 g da pulvorsukero kaj la saketo da vanila sukero.

Almiksu la kvar ovojn unu post unu kaj kirlu al glata kaj krema kunteniĝo.

4-Almeto de freŝa kremo

Almiksu la du kulerojn da freŝa kremo, la kuleron da oranĝflora akvo, la 90 gramojn da pulvoraj migdaloj, la saketon da gisto kaj la 90 gramojn da kribrita faruno, la kulereton da cinamo kaj la raspitan oranĝŝelon.

5-Preparo de la pomoj

Senŝeligu la 4 pomojn, traĉu ilin kvaronen, eltiru la kernujon kaj kernetojn. Maldikigu ilin al maldikaj lameloj, almetu ilin en paston, rapide miksu.

6-Kuirado

Verŝu tiun preparaĵon en muldilon kaj kuiru dum 50 minutoj.

Elmuldilu la kukon kaj forlasu ĝin malvarmiĝi sur krado.

Gustumado

Surtabligu la pomkukon ankoraŭ varmeta, iom post eliro de bakujo, kaj detranĉita al dikaj tranĉaĵoj; prezentu ĝin sur ĉiu telero kun unu kulero da densa freŝa kremo kaj unu kulero da oranĝmarmelado.

Bonan vojaĝon Marylène,



Nia amikino Marylène Jacquier, nin forlasis je la fino de januaro pro kancero. Ŝia forpaso tre emociigis tiujn kiuj konis ŝin.

Ŝi aŭdis pri E-o de instruistino en bazlernejo. Kun sia "fianĉo"

Alain, ŝi decidis eklerni E-on en 2008 en la kurso kiun mi gvidis.

Marylène bone progresis kaj partoprenis vigle kaj bonhumore en la agadoj de la klubo. Plurfoje ŝi akceptis afable la klubanojn en sia hejmo por "ĉetabla babilado".

Kun Alain, ili iniciatis la ĉeeston de E-o-budo en la Foiro Biozone en Mur de Bretagne. Ŝi ankaŭ plurfoje partoprenis la pluezekajn renkontiĝojn. Marylène, ni ne forgesos viajn afablecon kaj belan, longan harplektaĵon.

Armor Esperanto

Bientôt un jeune espérantiste étranger en Côtes d'Armor dans le cadre d'un Service Civil.

Depuis plusieurs années, le Conseil d'Administration d'Armor Esperanto a décidé de développer la connaissance de l'E-o auprès des jeunes. Pour cela, nous avons envisagé d'accueillir un jeune espérantiste étranger dans le cadre d'un Service Civique.

Qu'est-ce-qu'un Service Civique ?

Le Service Civique vise à favoriser l'insertion professionnelle d'un jeune par l'accomplissement de missions d'intérêt général, au sein d'une association ou d'un organisme public, pendant une période de 6 à 12 (en fait 8) mois. Les tâches confiées peuvent relever de différents domaines : éducation, santé, culture, relations internationales, solidarité, sport, protection de l'environnement.

Quelles conditions pour l'association ?

- être agréée ; il est possible de bénéficier de celle d'une union ou fédération d'associations comme la Ligue de l'Enseignement, la Fédération des M.J.C.
- verser au jeune une indemnité mensuelle (minimum de 106 €)
- proposer des tâches qui ne relèvent pas d'un professionnel et qui ne sont pas déjà effectuées par les bénévoles ; le Service Civique vise à développer de nouvelles actions
- ne pas exiger de diplôme pour les tâches proposées
- nommer un ou plusieurs tuteurs pour accompagner et aider le jeune
- proposer au jeune des formations sur la citoyenneté, les premiers secours etc ; les organismes agréés (Ligue de l'Enseignement) les organisent.

Quelles conditions pour le jeune ?

- être âgé de 18 à 25 ans révolus
- travailler pour l'association à raison de 24 à 35 h par semaine ; la Ligue de l'Enseignement limite à 24 h par semaine pour permettre au jeune de poursuivre des études, avoir un travail complémentaire etc
- avoir la nationalité de l'un des pays de l'Union Européenne
- l'association peut ajouter des conditions supplémentaires en fonction des missions ; ainsi pour Armor Esperanto, nous demandons un intérêt pour l'E-o.

Le/la jeune perçoit des indemnités mensuelles:

- de 467 € par l'État
- de 106 € de l'association d'accueil

Il bénéficiera d'une couverture sociale prise en charge par l'État.

Trouver un local approprié.

Pour accueillir un jeune, il faut disposer d'un local adapté pour travailler (avec un téléphone, un ordinateur...). Après avoir cherché pendant plusieurs années, nous avons finalement trouvé un arrangement avec une association qui s'occupe du jumelage entre le département des Côtes d'Armor et la région polonaise de Warmie Mazurie. Ce bureau se trouve dans la nouvelle Maison des Associations Départementales. Ce bureau est déjà utilisé par une jeune polonaise en Service

Civique pour l'association « Côtes d'Armor-Warmie Mazurie »).

Quelles missions ?

Ensuite, une commission de 4 membres du Conseil d'Administration a défini les missions qui ont été approuvées par le C.A. en septembre.

Les missions :

- participer à l'enseignement de l'espéranto auprès de nouveaux publics : enfants scolarisés dans le cadre des nouveaux rythmes scolaires, jeunes en FJT, en établissement d'enseignement secondaire et supérieur
- participer à l'établissement de relations entre ces jeunes et des jeunes d'autres pays, notamment européens
- participer à l'accueil d'espérantistes étrangers : préparation des conférences publiques, préparation de leur séjour dans le département
- participer à l'organisation de nouveaux événements facilitant les échanges entre espérantistes du département et espérantistes étrangers
- participer à la création et à l'amélioration d'outils pédagogiques à l'usage des enseignants d'Espéranto du département
- participer à la communication de l'association à l'échelle départementale: relations avec les médias, création/amélioration des outils de communication (dépliants, panneaux d'exposition etc)
- participer à l'amélioration et au fonctionnement du site web de l'association

Le choix final des missions sera défini avec le/la jeune accueilli-e en fonction de ses souhaits, de ses compétences et de son projet personnel.

Armor Esperanto aidera le jeune à remplir ces missions, par exemple par l'inscription à :

- des cours et stages d'Espéranto
- des cours de français.

Quel coût pour l'association ?

À l'indemnité de 106 € par mois, il faut ajouter les frais suivants :

- la location du bureau : 100 € par mois
- les frais de déplacement : 100 € par an (estimatif)
- les frais de fonctionnement (téléphone, photocopies) : 40 € par mois (prévisionnel)
- l'adhésion à la Ligue de l'Enseignement : 180 € pour l'année
- l'achat de mobilier : bureau, siège, armoire....

En novembre, Armor Esperanto a adhéré à la Ligue de l'Enseignement pour bénéficier de l'agrément pour l'accueil d'un jeune en Service Civique et faire paraître une annonce. Celle-ci a été diffusée par différentes listes espérantistes (TEJO, Espéranto France, Bretonio....) ainsi qu'à divers clubs en Pologne, Italie, Espagne....

Et maintenant nous sommes prêts à accueillir la bonne candidature.

Armor Esperanto

Baldaŭ eksterlanda esperantist-in-o en Côtes d'Armor kadre de Civita Servo

De pluraj jaroj, la Administra Konsilio de Armor Esperanto decidis reklami kaj konigi E-on al junuloj. Por tio, ni planis akcepti junan eksterlandan esperantiston kadre de Civita Servo.

Kio estas Civita Servo ? La Civita Servo celas helpi junulon trovi laboron per plenumado de misioj je komuna bono kadre de asocio aŭ publika institucio dum periodo de 6 ĝis 12 (fakte 8) monatoj . La taskoj povas rilati al diversaj fakoj : edukado, sano, kulturo, internaciaj rilatoj, solidareco, sporto, protektado de la naturo.

Kiuj kondiĉoj por la asocio?

- ricevi oficialan permeson : eblas uzi tiun de unio aŭ federacio de asocioj .(ekz : la Ligo de Instruado -Ligue de l'Enseignement, la Federacio de M.J.C. -Fédération des M.J.C.

- doni monkompenson (minimume 106 € ĉiumonate)
- proponi taskojn nek jam faritajn de bonvolontuloj, nek fareblajn de profesiuloj ; la Civita Servo celas disvolvi novajn agadojn.

- ne postuli iun diplomon por plenumi la taskojn
- nomumi gvidanton por akompani kaj helpi la junulon
- organizi trejnadojn pri civitaneco, sekureco, ktp ; pri tio zorgas la Ligo de Edukado

Kiuj kondiĉoj por la junulo?

- aĝo: de 18 ĝis 25 jaroj (26 jaroj minus 1 tago)
- agadi por la asocio po 24 ĝis 35 horoj semajne : la Ligo de Instruado limigas je 24 horoj semajne ; tiel la junulo povas sekvi studojn, iom labori ktp
- havi la naciecon de unu el la landoj de la Eŭropa Unio
- la asocio povas aldoni apartajn kondiĉojn laŭ la misioj ; ekzemple, por Armor Esperanto, ni postulis interesecon pri E-o.

La junulo ricevas ĉiumonate :

- stipendion de la franca ŝtato (467 €)
- monhelpon de asocio por nutraĵo kaj veturadoj (106 €)

La franca ŝtato zorgas pri la sansekureco.

Trovi taŭgan lokon. Sed por akcepti junulon, necesas disponi taŭgan lokon por labori (kun telefono, komputilo....). Post serĉado dum pluraj jaroj, ni finfine trovis interkonsenton kun asocio kiu zorgas pri ĝemeliĝo inter la departemento "les Côtes d'Armor" kaj la pola regiono

"Warmie Mazurie". Tiu loko troviĝas en tutnova Domo de Departementaj Asocioj (Maison des Associations Départementales). En la loko jam laboras pola junulino kiu laboras kadre de Civita Servo por la asocio "Côtes d'Armor - Warmie Mazurie".

Kiuj misioj ? Poste, komisiono de 4 membroj de la Administra Konsilio, difinis misiojn kiujn la A.K. aprobis en septembro.

Jen la misioj difinitaj :

- partopreni en instruado de E-o al novaj publikoj : infanoj kaj junuloj en lernejoj kaj junlaboristaj loĝejoj;
- partopreni en estigo de rilatoj inter ties junuloj kaj eksterlandaj junuloj
- partopreni en la akcepto de eksterlandaj esperantistoj preparado de ties prelegoj kaj restado en departemento
- partopreni en la organizado de eventoj faciligante la interŝanĝojn inter lokaj kaj fremdaj esperantistoj
- partopreni en la kreado kaj plibonigo de instruiloj
- partopreni en la komunikado de la asocio departementoskale : rilatoj kun la lokaj gazetoj kaj radioj, kreado/plibonigo de flugfolioj, broŝuretoj, ekspoziciopaneloj kaj plibonigo de la retejo de la asocio.

La fina elekto de la misioj estos difinita kun la junulo, laŭ ties deziroj, kapabloj kaj persona profesio-projekto. Por plenumi tiujn misiojn, la junulon helpas la asocio ekzemple per aliĝo al:

- esperantaj kursoj kaj studperiodo
- kursoj por plibonigi la kapablon paroli france .

Kiuj elspezoj por la asocio ? Al la monkompenson je

106 € monate, aldonas elspezoj por la asocio :

- luado de la loko : 100 € monate
- veturadoj : 100 € monate (prognoza sumo)
- funkciado (telefono, kopioj ktp) : 40 € monate (prognoza sumo)
- aliĝo al la Ligo de Instruado : 180 € jare
- aĉeto de mebloj : seĝo, skribotablo, ŝranko.....

En novembro, ni aniĝis al la Ligo de Instruado por havi permeson akcepti junulon kaj aperigi anoncon. Ni sendis la anoncon al diversaj esperantistoj (TEJO, Esperanto France, Bretonio.....) al diversaj kluboj en Pollando, Hispanio, Italio....Nun ni estas pretaj akcepti la taŭgan kandidatiĝon.....

Laurent Peuch

Verkajo

CEUX DE 14 TIUJ DE 14

« Ceux de 14 » estas verkaĵo de Maurice Genevoix [Moris Ĵenevoa] en kiu li rakontas siajn travivaĵojn dum la unua mondmilito ; ili estas klasitaj inter la plej sinceraj kaj veraj. Aliaj verkistoj eble certgrade « romancigis » la siajn. Tiam, kiam aperis tiu parto de la libro en 1916, kun multaj paĝoj cenzuritaj, oni ne povis scii ke la aŭtoro fariĝos fama verkisto, akademiano en 1946 kaj dumviva sekretario de la Akademio de 1958 ĝis 1974.

Eĉ dum milito oni povas ĝui plezurojn.

Pri la 30-a de septembro 1914, M.G. skribas :

« Kia gajeco, ĉimatene, sur la valetoj de Amblonville ! Milda suno, intensa blua ĉielo kun kelkaj blankaj nubetoj kiuj pigre ŝvebas. Apud mi, sur la flanko de la deklivo, miaj sekcianoj fosas tranĉeon. Mi grimpigis ilin preskaŭ ĝis la pinto, tie kie kalkŝtonoj anstataŭas argilon. Ilia tasko estas facila, la pioĉoj disgluas grandajn platajn tavolojn de mola ŝtono, kiuj apenaŭ sin tenas unuj al la aliaj kaj displitiĝas sub sia pezo.

Tute malsupre, sur herbejo, ĉe la bordo de rivereto, la kuiristoj ekbruligis siajn fajrojn. Ĉirkaŭ la marmitoj, kiujn kronas malpeza fumo, estas svarmo de viretoj blua kaj ruĝa. Sed, ĉio estas tiel nete prilumata, ke atente rigardante, tie kaj tie laŭvice, ĉiun detalon de la tuto, mi povas nomi ĉiujn tiujn pigmeojn...

...Pli dekstre, sur la alia flanko de la vojeto, kiu malsupreniras de nia monteto kaj aliras al la vojo, la kapitano Rive, sidanta sur arbotrunko, desegnas oni ne scias kion sur la tero per la pinto de sia »pikilo« babilante kun la kuracisto staranta apud li. Malantaŭ ili, renversita plugmaŝino rustas meze de kampo.

Mi pintigas mian krajonon... kaj mi skribaĉas kelkajn leteretojn. Du vortojn nur : Bonan sanon, bonan esperon...

...Mi ekstaras, malsupreniras kurante... Mi iras de kuirloko al alia, demandante, babilante, rigardante la fundon de la pladoj.

« Leŭtenanto ! Leŭtenanto !... Oni petas vin ĉe la oficiro-kasisto »

Ĉe la oficiro-kasisto ? Estas vere, la monato finiĝas hodiaŭ.

Mi estas kontenta havi la okazon solece promenadi. Rapidpaŝe mi iras sur la vojo, amuziĝante sekvi la mallongajn flugojn de alaŭdoj, kiuj bekas ĉevalfekaĵojn. Ili lasas min alproksimiĝi sufiĉe, tiel

ke mi distingas ilian nigran okulon, iliajn maldikajn krurojn kaj la plumtufon kiu kapvestas ilin. Kaj ili platiĝas, ŝveligante sian plumaron, tutrondaj, kaj ekflugas rapidege kiam mi estas preta atingi ilin. Ili ne iras for : nepezaj, ili alteriĝas meze de kampo kaj stariĝas sur sulkokreston. Kun la kapo klinita ili observas min. Kaj kiam ili taksas min sufiĉe for, ili reflugas rekte al la vojo, alteriĝas per elasta salteto precize sur la lokon kie mi timigis ilin kaj rekomencas beke traserĉi la sekajn fekbulojn.

Estas tagmezo, kiam mi forlasas la oficiro-kasiston, kun mia soldo enpoŝe. Mia promenado malsatigis min. Sed la perspektivo iri al la valetoj manĝi jam remalvarmiĝintajn kutimajn kradkuraĵojn perditajn en la fundoj de « rizo en graso » grumela, senentuziasmigis min. Mi ŝatus kviete gustumi delikataĵon, manĝaĵon vere bongustan kaj raran. Mi provos fari, tute sola, eksterordinaran tagmanĝon.

...Mi estas bonŝanca. Blanka domo kun suna fasado tuj altiras mian rigardon. Ĉe la sojlo, sur lignobenko, maljunulo sin varmigis en la hela lumo. Ni interkonsentis senpene. Li enirigis min en tre puran kuirejon, kaj sur ekflamiĝo de vito-sarmentoj, lia bofilino kuiris omleton kun lardo, kiun mi neniam forgesos. Kaj grimpinte sur seĝon, ŝi dekreoĉas de la plafono fumajtan ŝinkon, kiun ŝi komencis por mi.

Mi avide manĝis. Facile kaptebla por mi troviĝis panbulo freŝa, el kiu mi ofte detranĉis larĝajn pecojn. Kaj la maljunulo ankaŭ ofte plenigis

mian glason per « Toul-vino » roza, ŝaŭma kaj seka. La ŝinko ruĝis sur mia telero, kaj apud mia glaso kie dancis bobeloj, mirabel-konfitaĵo en grejsopoto ŝajnis diafana oro.

Post kiam mi senretene entranĉis en la pleno de la ŝinko, kiam mi duone malplenigis la konfitaĵopoton, mi plenŝtopis mian pipon kaj iom orgojle ekbruligis ĝin. Estis mi, kiu ĵus tiel festenis. Kun la okuloj duonfermitaj, mi rigardis la bluan fumon kiu malrapide alŝvebis al la solivoj, sensenta pro fizika kontentiĝo, akrece elvokante la kamaradojn, tie en la valetoj, kun siaj sengustaj kradrostaĵoj kaj sia rizo en graso koaguliĝinta. Mi tute dronis en profundegan kontentecon, al kiu miksiĝis, igante ĝin perversa, rimorso.

Tradukis F. LE MAGADURE

Agendo 2015

21 mars

Lasta Eo Sabato en Vannes

3 au 8 avril

Rencontre de la chorale

Interkant'plu
et de la Kompanoj

à

Grésillon.



Dates 2015

- ▶ 17 -27 avril
- ▶ 6 - 14 juillet
- ▶ 20 -25 juillet
- ▶ 1er- 8 août
- ▶ 8-16 août
- ▶ 24 octobre-1er novembre

17a de majo

HERBIGNAC-ESPERANTO PIKNIKO

Ĉi-jare, la piknik-tago de Herbignac-Esperanto okazos la 17-an de majo...

Pliaj informoj venos pli poste, tamen vi bonvolu tuj noti la daton sur vian agendon.

Antaŭdankon al niaj gefideluloj kaj al ĉiuj, kiuj vizitos nin je tiu okazo.

Cette année la journée pique-nique de Herbignac-Espéranto aura lieu le 17 mai.

D'autres informations viendront plus tard, mais vous pouvez tout de suite noter la date sur votre agenda.

Merci anticipé à nos fidèles participant-e-s et à ceux

STAĜO

« ESPERANTO & ALTERNATIVAJ VIVMANIEROJ »

Kadre de sia ĝemeliĝo, Esperanto Bourg en Bresse (Francio) kaj LLG-instruistoj de Liberigitaj Lernejoj por Gelernantoj (Koreio) organizas la

5-an someran staĝon pri alternativaj vivmanieroj pere de esperanto.

de la 20-a ĝis la 23-a de julio 2015

LILLE 2015
esperanto
Ni subtenas!

UEA

25 JUILLET AU 1er AOÛT

100 a UNIVERSALA KONGRESO

